N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz JULIO-AŬGUSTO 1994

## ARĜENTA INSIGNO KUN VERDA STELO

Farita de juvelisto simpatianto de Esperanto, MEL oferas po 300 ptj esperanta insigno farita el arĝento kun emajloj blanka kaj verda. Sendoj po dek (10) antaŭpago de 2.700 ptj pere de poŝtmandato al Madrida Esperanto-Liceo (inkludas sendokoston).

## ESPERANTO EN KOMERCO

Germana entrepreno "Software AG" baptis kun la nomo ESPERANT al nova grafika ilo por alvoki datumbazojn pere de SQL kaj speciale por esti uzata de ne SQL-konatuloj.

## UNU JARO POSTE

Kunmemorante la laboron kiu MEL-anoj faris dum la pasinta UK de Valencio, MEL invitis al la membroj kiuj kunlaboris antaŭ unu jaro en la preparo de UK. Naŭ personoj vizitis la palacon El Pardo kaj poste kune manĝis en liber-aera restaŭracio.

## NUR POR KOLEKTANTOJ

Liceo havas malgrandan stokon de la libro "El esperanto en 20 leciones" de V. Inglada. Eldonita en **1931**. Ni sendos tiun ĉi libron plus "Seminario pri sporto-1982 (kun sporta terminaro en esperanto)" nur po 1.000 pesetojn (inkludas sendokoston). Antaŭpago necese pere de poŝtmandato al Liceo.

## HEF ANGULO aŭ MEL sugestas

HEF sendis cirkuleron dankante la sendon de datenoj por la aktualigo de sia datenbanko. La_ HEF-sekretario ĉ*i-tiu datenbanko estas unu el la novaj kaj ĉefaj laboriloj de HEF. Ĝi konsistas ne nur el HEF-anoj, sed ankaŭ el informpetintoj, kursanoj, informistoj, junularaj centroj, kulturejoj, prelegejoj, kongrucelaj asocioj, periodaĵoj, radioj, ktp, kies datenoj oni plinombrigas regule. Per tiuj datenoj eblas fari pli rapide kaj efike ne nur kutimajn taskojn, ekzemple elektitajn etikedojn kaj cirkulerojn, sed baldaŭ ankaŭ statistikojn, raportojn, adresarojn, ktp., kiuj certe estos utilaj al niaj komunaj celo kaj laboro. Ĉar la etikedoj por "Boletín" oni faras en la HEF-oficejo sufiĉe antaŭ ties sendado, ne timu, se vi korektis vian adreson kaj tamen vi ne ricevas ĝin ĝusta sur la etikedo de venonta "Boletín"*

## KASEDA REVUO

Denove ni anoncas sonrevuon eldonitan antaŭ 12 jaroj. Vi povas ricevi se vi sendas kasedon al Adamo Goralski. Gral Fanjul 17-1ºD, ES-38006 Santa Cruz de Tenerife.

## FINFINE HEJME

Lucrecia San Antonio post kelkaj monatojn en fisioterapia centro jam estas hejme, Ĝi daŭrigas siajn poetikajn kunlaborojn en diversaj revuoj kaj ĉiam propagandas esperanton. Ŝia lasta eldono estis mirinda libro kun "coplas" de sia patrino, vi povas aĉeti kontraŭ mil PTA.

## LEXICON SOPENA

MEL deziras koni opinion de aliaj esperantaj grupoj rilate intereson por aĉeti KOMPLETAN STOKON de la sola vortaro hispana-esperanto-hispana. La eldonejo SOPENA havas ekonomiajn problemojn kaj eble neniam reeldonos tiun ĉi vortaron. Pro tio nun povas esti taŭga momento por aĉeti tutan stokon kaj kopiajn rajtojn. Bv. informi al MEL pri la mono kiun via grupo povas investi.

## SUKCESA DEKJARIĜO

Koruso kaj orkestro "Verda Stelo" festis siajn dek jarojn. La koncerto, en preĝejo San Jerónimo el Real, estis altkvalita sukceso kiun atestis madridaj esperantistoj kaj muzik-amantoj kiuj plenumegis "Los Jerónimos". Diversaj naciaj ĵurnaloj anoncis la programon kaj "Tele-Madrid" televidis parton de la koncerto. MEL, kiu aŭspicias kaj apogas Verda Stelo-n deziras ĝin minimume aliajn 10 sukcesajn jarojn.

**KONGRESOJ**

16-21a de julio en Málaga, 53a Hispana Kongreso de Esperanto

9-a ĝis 14-a de aŭgusto "Eŭska aventuro" ĉefe por gejunuloj. Eŭska Esperanto-Asocio.

8-11a de septembro. 1-a Seminario "Esperanto: Kulturo kaj socio". Temo: Rasismo kaj ksenofobio en la nuna Eŭropo. Paterna (Valencio) (Petu aliĝilon ĉe MEL)

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º

Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13-3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

Venontaj programoj, ĵaŭde ekde la 19.00h dum julio (eble ankaŭ dum aŭgusto kaj septembro) okazos esperanta parol-rondo en trinkejo apud enirejo "Puerta de Alcalá" ene de parko Retiro.

DUM AŬGUSTO LA SIDEJO DE MEL (Atocha 98) ESTOS FERMATA

**F E L I Ĉ A N   S O M E R O N**

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal